

La kursoj, kiuj disvolviĝos en la urbo La Chaux-de-Fonds sub la nomo
Internacia Feria Altlernejo
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 708, 1977.05.04 & 06 & 07

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

A.- Hodiaŭ ni deziras atentigi vin pri la kursoj, kiuj disvolviĝos la venontan someron en la urbo La Chaux-de-Fonds sub la nomo Internacia Feria Altlernejo. Ili prezentos intereson por esperantistoj, kiuj deziras lertiĝi en la praktiko de la internacia lingvo kaj intimiĝi kun ties literaturo.

A.- La unua kurso disvolviĝos de la 20-a ĝis la 26-a de junio. Ĝi estos enkonduko en la esperantan literaturon, kiun gvidos sinjoro E. Borsboom, gimnazia instruisto en Utrecht, Nederlando.

Cl.- La sama enkonduka kurso en la esperantan literaturon reokazos de la 8-a ĝis la 14-a de aŭgusto.

A.- Dusemajna kurso por franclingvanoj permesos lertiĝi en la traduko de la franca al esperanto kaj inverse. Ĝi disvolviĝos de la 11-a ĝis la 24-a de julio kaj ĝin gvidos sinjoro Claude Piron, ekstradukisto ĉe UN kaj Mondorganizaĵo pri Sano, kaj instruisto en la Universitato de Ĝenevo.

Cl.- Meza kurso de esperanto okazos de la 15-a ĝis la 21-a de aŭgusto, kaj ripete la sekvantan semajnon, de la 22-a ĝis la 28-a de aŭgusto. Ĝin gvidos sinjoro Giorgio Silfer, la redaktoro de *Literatura Foiro* kaj de *Kontakto*.

A.- Ĉiu kurso disvolviĝos laŭ tiu ĉi lekci-horaro. La alventago estos la dimanĉo. Vespere okazos interkona kunsido. Lundo havos je sia programo 6 lekciojn, 3 la matenon kaj 3 la posttagmezon. Marde okazos 3 lekcioj la matenon kaj la posttagmezo estos libera. Ĝi permesos al ĉiuj iom ripozi, viziti la internacian horloĝmuzeon se malbelveteras, kaj se belas promenadi en la paŝtejoj, kiuj bordas La Chaux-de-Fonds. Merkrede denove disvolviĝos 6 lekcioj. Ĵaŭde matene 3 lekcioj, kaj la posttagmezo estos dediĉita al ekskurso, kiu permesos al ĉiuj malkovri karakterizaĵojn de la montaro Ĵuraso. Vendredo konkludos la kurson kun siaj 6 lekcioj kaj sabato estos la forirtago. Ĉiuj vesperoj estos liberaj. Entute estos do 25 lekcioj, kio permesos plenumi efikan laboron sub la gvidado de kompetentaj instruistoj.

Cl.- La kursejo troviĝas en Kultura Centro Esperantista, kaj jam ekzistas ebleco loĝi surloke en la nun kreata Gastejo Edmond Privat, tio je tre moderaj prezoj. Kiuj deziros pli komfortajn ĉambrojn, ricevos la liston de la hoteloj, pensionoj kaj gastejoj.

A.- Pri la kursoprezo ni menciuj, ke ĝi estas po 100.- svisaj frankoj por unu semajno. Tiu ĉi sumo inkludas nur la instruadon. Al tio aldoniĝas la loĝ- kaj manĝ-elspezoj. En la kreata Gastejo Edmond Privat la tranoktado kostas 6 svisajn frankojn kaj ekzistas ebleco mem pretigi siajn manĝojn. En la urbo La Chaux-de-Fonds ekzistas moderprezaj hoteloj kaj restoracioj.

Cl.- Interesatoj pri tiuj ĉi kursoj sendu kiel eble plej rapide sian informpeton aŭ aliĝdeziron al la ĉisekva adreso : Kultura Centro Esperantista, Poŝtfako 621, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Ni ripetas : Kultura Centro Esperantista, Poŝtfako 621, CH-2301 La Chaux-de-

Fonds, Svislando. Ili ricevos informilon, kiun oni ankaŭ povos peti tra la kanalo de nia radio-elsendejo.

A.- Oni petas la kurspartoprenontojn sin pretigi al la kursoj, ekzemple per legado de libroj se temas pri la enkonduka kurso en la esperantan literaturon. La programo de tiu ĉi kurso estas tiel difinita : « *Al la kursanoj estos montrita la evoluo en la esperanta literaturo de la lingvo mem, de la formoj aŭ ĝenroj kaj de la temoj. La kurso havos la karakteron de seminario. La kursanoj ne nur aŭskultos lekciojn, sed ankaŭ grupe ili esploros kaj solvos literaturajn tekstojn : a) komparo de prozaj tekstoj ; b) legado ; c) analizado de poeziaj tekstoj por trovi stilajn fenomenojn.* »

Cl.- Pri la Meza kurso de Esperanto ni citu kelkajn frazojn el la informilo : « *La meza grado ŝajnas la plej malfacila, ĉar ĝi supozas kaj studon pri la lingvo kaj studon prio la lingvofruktoj. Por nacia lingvo, tiu ĉi estas la nivelo inter la lastaj elementaj klasoj kaj la mezlernejo. [...]* Pro la evidenta plurfaceteco de la prezentebla materialo (lingvo, literaturo, movado) por la meza kurso ni devas elekti krestomatian formulon : kio ne estas novaĵo. Nova estas la fakto, ke por nia krestomatio ni elektis inter la ĉefaj verkistoj, do ni utiligas prozaĵojn kaj poeziaĵojn lingve analizendajn, literature valorajn, movadhistorie proponeblajn, kun la intenco eduki sobran, ne verdan esperantiston kaj stimuli lin al persona pliprofundigo. »

A.- El la informilo pri la tradukkurso ni ankaŭ citu kelkajn frazojn : « *En pluraj landoj oni konstatas evoluon favoran al esperanto. Tio kaŭzas kreskon de la tradukpetoj. Pro manko de profesiuloj la tradukoj ĝenerale estas amatoraj. Ofte montriĝis, ke ne sufiĉas scii du lingvojn por kapabli taŭge traduki el unu en la alian. La kurso celas ebligi al la interesatoj atingi nivelon kiel eble plej proksiman al tiu de profesia tradukisto. Ĝi pritraktos la teorion kaj praktikon de la arto traduki.* »

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !